Eduard Möricke,

Dum meza nokto

tradukita de Manfred Retzlaff

Eksonĝis kalme la vesper',
la nokto venis al la ter',
la oraj pelvoj de la temp-pesil'
egale kuŝas nun en la trankvil';
kuraĝe fluas de l' supro de l' mont'
kaj kantas susure la akvoj de l' font'
pri l' tago,
pri la tago hodiaŭ estinta.

Pradormo-kant' de l' nokto patrin' -
la fonto ne atentas ĝin;
la fuĝaj tago-horoj plaĉas pli
sub la ĉiela dolĉa blu' al ĝi.
Kaj ĉiam parolas de l' fonto la flu',
rakontas la akvoj dormante eĉ plu
pri l' tago,
pri l' tago hodaŭ estinta.

Traduko de la Germana poemo "Um Mitternacht" de Eduard Möricke *(Eduardo Mojriko, ∗1804-09-08 – †1875-06-04) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984-06-11.*

MR-100-3 / Arg-759-1525 (2013-01-05 10:13:45)